



## Protokolo de la Estrar-kunsido de ELI: 9-a de Februaro 2016

**Ĉeestantoj:** Amri Wandel, Jehoŝua Tilleman, Matilda Landaŭ, Dror Gaon, Ŝlomo Ŝaĥar, Miĥal Amir, Eldad Salzman, Gabi Zeevi.

*Jehoŝua (laste) laŭlegas la lastan (12-an de januaro 2016) protokolon.*

**Raporto:** Jehoŝua kontrolis en Comet Sfarim, ke en nove aperinta libro pri Raĥel la poetino estas menciinta sian amaventuron kun esperantisto.

### **1. Asekuro por la klubejo / la klubanoj:**

- a) Kontrakto kaj pago al Bikurej Haitim: Amri sendis leteron al la instancoj kun kopio al Ariela – ŝi tuj aprobis kaj promesis plusendi mem. Ankoraŭ ne alvenis reago.
- b) Trovo de alternativa loko: VICO apud hospitalo Iĥilov. Joela ne havis tempon pro malsano, trajtos venontsemajne.
- c) Alternativo: Miŝan (Ramat Aviv) - Matilda demandis. Ili ne povas kaj ne emas certigi lokon por ĉiusemajna renkontiĝo.

### **2. Dratverejo** (Jehoŝua)

- a) Kontrakto-renovigo la kun la vidvino: ŝi tre ĝojis pro la decido ke ŝi pagos malpli (2000). Jehoŝua reformulos la kontrakton tre zorgeme, renkontiĝos kun ŝi kaj subskribigos ŝin.
- b) Serĉo de nova luanto (Eran), Eran respondecas sed verŝajne ankoraŭ nenion faris.
- c) Serĉo de oficejo en Tel Avivo – Amri: necesas informiĝi pri la ebleco plu luigi ĝin kaj pri la luigo-kondiĉoj. Gabi: aĉetkosto de oficejo en TA-regiono: ĉ. 7000 NIS/m<sup>2</sup>, do, eblas trovi grandan oficejon, pli ol 100 m<sup>2</sup>, por malpli ol ni ricevus por la apartamento (ĉ. 900,000 NIS). Intertempe neniu volontiĝas kaj okupiĝas pri tiuj.

### **3. Financoj** (Ŝlomo)

- a) Letero estis sendita kun reformulitaj rezulto por 2015 kaj buĝetoj por 2016/17 al "Raŝam Haamutot" – ankoraŭ ne venis respondo.
- b) Ĉu la financaj raportoj pri 2015 estas en ordo? Ŝlomo proponas raporti kaj sekvi pri la elspezoj ĉiujn tri monatojn. Amri respondas ke tio estas superflua, ĉar oficiale ni devas raporti nur jarfine. Ĉiukazi li sendos la raporton pri 2015 rete al la estraranoj, ili estas petataj legi kaj eventuale rimarki. Diskutenda en la marta kunsido!

2/...



#### 4. Nova Estraro kaj proceduroj

- a) Ĉu necesas antaŭ ĉiu kunsido laŭtlegi la protokolon? Propono post debato: ne, sed la estraranoj tralegu rete, kaj antaŭ ĉiu kunsido anstataŭ laŭtlego ili aprobos, aŭ - aldonos siajn rimarkojn. *(Unuanime akceptata)*
- b) Disdonado de taskoj: la samaj taskoj kiel pasintjare, plus-minus kelkaj etaj ŝanĝoj. Matilda ne volas plu esti zorganto de la libroservo (ĝi povas esti vaka). Eble Doron akceptos la taskon. Dror ricevis la ŝlosilon de nia poŝta kesto – li loĝas plej proksime al ĝi.
- c) Komitatano A: nun estas Eran. Amri ne rekandidatiĝos al B-komitatano post 4 mandatoj (12 jaroj) sekve li povas esti komitatano A por Israelo. Ŝajne Eran konsentos cedi, ĉar li malofte iros al UK, sed ni ne decidu sen li; Amri parolis kun li.
- ĉ) Komisiito pri junularo kaj JELI: Eran ne konsentas mencii en la Jarlibro ke JELI eĉ provizore malfunkcias. Jehoŝua parolos kun li.
- d) Reta diskutado kaj debato de longaj temoj antaŭ la kunsido: prokrastite!

#### 5. Israela Esperantisto (Amri)

Pretigo de la kovertroj dum la kunsido: surgluo de la etiketoj (antaŭa laboro farita de Jehoŝua kaj Amri). *Dankon al Miĥal, Eldad kaj Dror!*

#### 6. Jagil

Li petis ricevi la mesaĝojn de ELI-listo. Enrika parolis kun li, kaj li denove promesis pagi por 2016. Propono: Enrika renkontiĝu kun li, prenu lian pagon, kaj pasigu ĝin al ni!

#### 7. La 17-a Israela Kongreso (Amri)

- a) Anonco aperos en la februara n-ro de la bulteno Esperanto, kiu ege malfruas - 1/16-a sur la dorsa kovrilo.
- b) Aliĝilo – ne estas bezonata ĉi-jare, ne verkiĝos. *(unuanime akceptita)*
- c) Limdato de ĉambro-mendoj: morgaŭ (la 10-a de februaro).
- ĉ) Programo: Amri dissendis detalan programon, pli-malpli en ordo, sed ĝi ankoraŭ ne aperas surrete.
- d) Ekskursoj – Amri rezervis jam la Masada-gastejon por Nelly kaj la du Kajtanoj. Nelly alvenos la 11-an, kaj volas partopreni en la AK - Jehoŝua devos aranĝi kun ŝi, rezervi gastejon por la 12-14.4 en Haifa.

3/...



e) Subvencioj: Renato alvenos je propra kosto, gvidos debaton – ni subvenciu per 50 eŭroj. Kajto – jam pritraktata antaŭe. Doron petis pro lia kontribuo – ni subvenciu per 100 NIS. Daniela – nova esperantistino - plendis pro pago tro alta por ŝi – ni subvenciu per 100 NIS. Avigail – nia malnova samideanino – ne kapablas pagi la plenan sumon - ni subvenciu per 300 NIS.

Blokaj subvencioj: ELI subvencios la pagon por la programo per 50 sikloj (oni pagos 100 NIS anstataŭ 150) – ĉ. 30-oble. Plue: ELI subvencios ĉ. 50 NIS po persono por la ĵaŭda vespermanĝo, se ĝi estos fiksa menuo, aŭ ĝis 50 NIS unuope ĉiun, se la menuo estos individue laŭplaĉa.

Individuaj voĉdonoj: *ĉiuj estis akceptitaj per la plimulto, kun du sindetenoj kaj du kontraŭoj.*

**La venonta kunsido:** marde, la 8-an de Marto 2016, je 19:30

**Protokolis:** Gabi Zeevi